n-ro 50

oktobro 1995

<u>Elektronika poŝto</u>

Jenaj estraranoj de IKEF estas atingeblaj tra elektronika poŝto:

Roland ROTSAERT: rotsaert(a)knooppunt.be

YAMASAKI Seikô: study069(a)jpndokyo.dokkyo.ac.jp

<u>Kotizoj</u>

La ĝenerala kunveno de IKEF konfirmis decidon de la estraro, laŭ kiu la baza kotizo por "riĉaj" landoj iĝos 600 belgaj frankoj jare (vidu p. 2 kaj 5).

Ĝis fino de novembro ankoraŭ eblas <u>antaŭ</u>pagi la kotizon por venonta(j) jaro(j) laŭ malnova tarifo.

<u>Enhavo</u>

Malferma letero de la prezidanto . . . . . . . . . . . . . 3
Seminario pri optimumaj strategioj . . . . . . . . . . . 4
Ĝenerala Kunveno de IKEF . . . . . . . . . . . . . . . . 5
Kongresaj fotoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6-7
IKEF-membroj elektiĝis prezidanto de UEA . . . . . . . . 8
Vizito en la Komerca Ĉambro de Tampereo . . . . . . . . . 9
Regularo por perantoj . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
Novaj aliĝoj - Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . 12

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Identecŝildaro estas jara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: ĉe s-ro Frans Josef Braun,
Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado: ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32.(0)50.330004; elektronika poŝto: rotsaert(a)knooppunt.be.

Atentu ! Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

La jara membreca kotizo estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD, 2 200 enoj) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD.

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per eŭroĉeko (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT.

Perantoj:

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István GETHER, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco PICASSO, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi,
Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 1400 enoj)

## Malferma letero de la Prezidanto

Estimataj gekolegoj, karaj IKEF-anoj !

Ĉi tiu kajero de "La Merkato" portas la iom jubilean numeron 50. Kaj ĝuste kaj ĝustatempe ĝi ankaŭ estas ornamita per nia nova emblemo. Tio, kombinita kun la 10jara jubileo de IKEF, ŝajnas al mi inda por plibeligita vesto por nia revuo.

Ni ĵus revenis de la 80a UK en Tampereo, Finnlando. Tie nia fakgrupo estis festanta sian 10jaran ekzistadon, ĉar kiel vi ja scias, ĝi estis fondita dum la 70a UK en Aŭgsburgo je la 6a de aŭgusto 1985. Efektive tiu "festado" okazis nek per solena celebrado kun gratulaj paroladoj, nek per disdono de donacoj aŭ prezentoj, nek per aperitivo, muziko, bankedo aŭ dancado. Ĝi simple okazis per diligenta agado, sukcesa laboro kaj pliaj flankaj sukcesoj dum la kongresa semajno.

Bonvolu permesi al mi, ke mi citu la opajn okazaĵojn:

1. Membro nia, nome la korea profesoro pri ekonomiko, d-ro LEE Chong-yeong, estis elektita de la UEA-Komitato kiel nova <u>prezidanto de UEA</u> por la sekvontaj tri jaroj.

2. Kiel lastjare nomumita "Aliĝinta faka asocio de UEA" IKEF rajtas delegi propran membron al la Komitato, la plej supera instanco de UEA. Unuafoje en Tampereo, nia membro, d-ro Gianfranco POLERANI, partoprenis la kunsidojn de la Komitato kaj kundecidis pri la aferoj de UEA.

3. Dum nia Ĝenerala Kunveno partoprenis 41 personoj, inter ili 18 membroj kaj 23 interesitoj. La sepkapa estraro estis reprezentata per kvin estraranoj. Ĉiuj proponoj de la estraro estis aprobitaj de la 18 ĉeestantaj membroj. Vidu la raporton pri la Ĝenerala Kunveno sur paĝo...

4. Kvin novaj membroj dum la Ĝenerala Kunveno aliĝis.

5. Du IKEF-membroj, nome profesoro d-ro LEE Chong-yeong (nova UEA-prezidanto) kaj s-ro YAMASAKI Seikô, lekciis en la kongresa universitato IKU pri ekonomiaj temoj.

6. Esperanto-Centro Paderborn, Germanio, kune kun IKEF aranĝis dum la kongreso kvartagan seminarion pri optimumaj strategioj. Temas pri EKS (Energi-kibernetika strategio) de la germana sistemesploristo Wolfgang MEWES, kion instruis dum tiuj kvar tagoj s-ro Hermann BEHRMANN de le Esperanto-Centro. Vidu raporton pri tio sur paĝo ...

7. IKEF aranĝis viziton al la Komerca Ĉambro en Tampereo. Partoprenis entute 30 personoj. Ili ricevis valorajn informojn pri la ekonomia situacio de Tampereo kaj Finnlando. Vidu raporton pri tio sur paĝo ...

8. La estraro de IKEF faris du apartajn kunsidojn kaj pritraktis diversajn temojn. I.a. oni definitive ellaboris regularon pri perantoj de IKEF.

9. S-ro YAMASAKI Seikô deklaris sin preta transpreni la vakan postenon (post eksiĝo de Hans WIERSCH) de kunordiganto de la Terminaro Sekcio de IKEF. Estas dezirinde, ke membroj kapablaj pri terminika laboro anoncas sin al s-ro YAMASAKI por kunlaboro en la Terminara Sekcio.

10. La nova emblemo de IKEF estis multfoje laŭdata, kaj entuta la renomo de nia fakgrupo en la Esperantista mondo kreskas.

Do, karaj gekolegoj, vi vidas, ke IKEF pritraktis ĉi-jare ampleksan programon kaj montris sin plej agema dum ĝia ekzistado, entute digna por la 10jara jubileeto. Mi kore dankas al ĉiuj, kiuj eĉ nur iomete kontribuis al tio. Kaj mi same kore invitas ĉiujn aliajn membrojn, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne agadis aŭ ne povis agadi, ke ankaŭ ili laŭ siaj ebloj faru ion, por ke IKEF plu kresku kaj finfine konfirmiĝos la antaŭlaŭdo de UEA pri nia bone funkcianta asocio.

Frans Josef BRAUN

## Seminario pri optimumaj strategioj por entreprenoj kaj individuoj

Lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede de 12.30 ĝis 14.00 h. en la kongresa semajno s-ro

Hermann BEHRMANN, estro de la Esperanto-Centro Paderborn, Germanio, pritraktis la sistemon EKS de la germana sistemesploristo kaj entreprenkonsilisto Wolfgang MEWES. EKS signas energi-kibernetika strategio (antaŭe en la germana: Engpass-konzentrierte Strategie; Engpass = mallarĝaĵo, istmo, botelkolo).

Jen lia ĉefa mesaĝo: Sukceso dependas nur de la ĝusta strategio ! Kontraŭe al aliaj strategioj rekomendantaj ke iu diversigu siajn agadojn al pluraj objektoj/negocokampoj por sekurigi sian pozicion, MEWES strikte konsilas, ke oni koncentru sin nur al unu afero/negocokampo, nome al tiu, kie oni posedas siajn plej grandajn fortojn kaj spertojn kaj kiu evidente estas istmo/botelkolo; Do, forigo aŭ plivastigo de tia istmo/botelkolo aŭtomate alportas agnoskon kaj sukceson.

La opaj paŝoj de EKS estu plenumotaj en jenaj sep fazoj:

1) Per analizado malkovri siajn specialajn kapablojn, sciiĝi pri siaj propraj fortoj (tute neglekti siajn malfortojn !);
2) elekti la plej sukcespromesan agad-/negocokampon;
3) trovi la plej interesan celgrupon;
4) solvi la plej ardan problemon de la celgrupo;
5) per inovacioj daŭre konservi antaŭecon;
6) transiri de konkurencado al partnereco;
7) certigi daŭran sukceson per kontentigo de konstantaj bazaj bezonoj.

Hermann BEHRMANN, profesie instruisto, montris per facile kompreneblaj ekzemploj, kio kaŝiĝas malantaŭ tiuj sep fazoj. Li provis apliki la EKS ankaŭ je la situacio de UEA aŭ de simpla loka Esperanto-klubo. Kio do estas la fortaj kapabloj de tia loka klubo; kiu estas ĝia plej interesa celgrupo, kaj kiu arda problemo malhalpas tiun celgrupon ? Ek al la solvo !

Montriĝas evidente, ke por trovi la ĝustajn respondojn al tiuj demandoj, oni devas pli analize kaj profunde mediti, ol estis eble dum tiuj kvar foje 1,5 horoj. Ankaŭ estis iom malhelpe, ke dum la tuta semajno ne ĉeestis la sama aŭskultantaro, sed ĉiutage venis novaj interesitoj, por kiuj s-ro BEHRMANN devis ripete prezenti la enkondukon de la seminario kaj la rezultojn de la antaŭaj tagoj. La tezoj de Wolfgang MEWES estas milfoje pruvitaj, diris s-ro BEHRMANN. Sufiĉe granda nombro de partoprenintoj de la seminario poste esprimis sin konvinkita pri la ĝusteco de EKS.

Nome de IKEF, kiu estis kunorganizinta la seminarion kun Esperanto-Centro Paderborn kaj ankaŭ kune kun ĝi portis la kostojn, prezidanto Franz Jozef BRAUN dankis s-ron BEHRMANN pro ties iniciato kaj agado kaj esprimis sin kontenta pri la aranĝo.

FJB

## Ĝenerala Kunveno de IKEF

Je ĵaŭdo, 27a de julio 1995, 9.00 h., okazis la ĉi-jara Ĝenerala Kunveno de IKEF en la salono Klemola kadre de la 80a Universala Kongreso en Tampereo. Ĉeestis entute 41 personoj, inter ili 18 membroj kaj 23 interesitoj. La estraro estis reprezentata per kvin el sep estraranoj, nome s-ro Franz Josef BRAUN, prezidanto, s-ro Roland ROTSAERT, financa konsilanto, d-ro GETHER István, s-ro François-Xavier GILBERT kaj s-ro YAMASAKI Seikô. Jen la tagordo:

1. Raporto pri la agadoj de IKEF dum la jaro 1994
2. Financa raporto pri la jaro 1994
3. Decido pri la uzo de la financa rezulto de 1994
4. Elekto de estraranoj
5. Diskuto kaj decido pri plialtigo de nia kotizo
6. Ĝenerala diskuto pri celoj kaj agadoj de IKEF

Prezidanto Braun prezentis la raporton pri la agadoj de IKEF. Ĉar la fakgrupo ĉi-jare ekzistas 10 jarojn, en sia raporto li menciis la ĉefajn atingaĵojn en tiu pasinta jardeko, ekzemple eldonon de la Esperanto-versioj de la terminaro de la Interancia Komerca Ĉambro en Parizo kaj de la glosaro "Ekonomio-financo-mono" de la Eŭropa Unio, de la broŝuro KIU FARAS KION de la Komerca Ĉambro Bar-le-Duc, Francio, de fakaj publikaĵoj en diversaj revuoj, speciale en MONATO, reklamanoncojn de entreprenoj en MONATO, komercadon inter Esperanto-parolantaj firmaoj, vizitojn ĉe firmaoj dum UK-semajnoj, senkostan peradon de anoncetoj de esperantistaj komercistoj, prelegoj pri ekonomiaj temoj diversloke. La membraro kreskis dum la dek jaroj al 115.

Ĉefa temo de la estraro dum 1994 estis la ellaboro de agadprogramo 1994-95. Temas pri taŭgaj agadoj rekomendindaj al la membroj. Ili estis jam dufoje publikigitaj en "La Merkato", n-roj 45 kaj 47. Dum la jaro 1994 okazis diversloke kunvenoj, kie IKEF estis reprezentita de pluraj membroj. Fine IKEF estis akceptita kiel "Aliĝinta faka asocio de UEA" kaj la estraro decidis pri nova emblemo.

S-ro Rotsaert prezentis la financan raporton pri 1994. Ĝi rezultis en malgajno de 2.164 belgaj frankoj. Kaŭzo de tio estis antaŭ ĉio malvigla eniro de membrokotizoj unuflanke kaj plialtiĝo de ĝeneralaj kostoj aliflanke. La ĉeestantaj membroj unuanime aprobis ambaŭ raportojn kaj decidis depreni la deficiton de 2.164 belgaj frankoj de la kapitalo.

La kreskado de la kostoj dum la lastaj jaroj kaŭzis la neceson plialtigi la kotizon. La estraro proponis plialtigi la ĝisnunan unuecan kotizon de 400 al 600 belgaj frankoj por membroj loĝantaj en landoj laŭ UEA-kategorio A. Por membroj en landoj laŭ UEA-kategorio B (landoj kun pagoproblemoj) ĝi restu je 400 belgaj frankoj. La ĉeestantaj membroj akceptis la proponon per 17:1 voĉoj.

La Ĝenerala Kunveno reelektis preskaŭ unuanime la ĝisnunajn estraranojn, kies oficperiodo finiĝis ĉi-somere, nome d-ron Gether, s-ron Gilbert, s-ron König, s-ron Rotsaert kaj s-ron Yamasaki. Ne estis proponitaj aliaj kandidatoj.

En la ĝenerala diskuto montriĝis forta bezono por merkataj informoj flanke de la komercistoj ĉefe en orient-eŭropaj, eks-socialismaj landoj. Ankaŭ bazaj libroj estas bezontaj en la tereno de ekonomiko kaj komerco. Por realigi tion, IKEF bezonus antaŭ ĉio pli fortan terminaran sekcion por esperantigi la ĉ. 20.000 nociojn el ekonomiko kaj komerco. La prezidanto raportis, ke post la domaĝa eksiĝo de la ĝisnuna kunordiganto s-ro Hans WIERSCH, s-ro YAMASAKI deklaris sin preta transpreni tiun vakan postenon. Li alvokis la membrojn al kunlaboro en tiu fako.

FJB

## IKEF-membro elektiĝis prezidanto de UEA

Komence de aŭgusto, F.J. Braun sendis jenan leteron al Profesoro LEE:

Estimata profesoro LEE,

Ankoraŭfoje mi volas gratuli al vi pro via elektiĝo je prezidanto de UEA, ankaŭ en la nomo de ĉiuj membroj de IKEF.

Kompreneble ni tre ĝojas kaj ni estas tre fieraj, ke membro de ni ricevis tiun plej altrangan postenon de UEA. Tio certe donos antaŭenpuŝon por la ekonomiaj ideoj kaj necesoj ene de UEA, sed espereble ankaŭ por nia agado ene de IKEF. (...)

Multe da sukceso en via ofico kiel UEA-prezidanto favore al la plivastigo de Esperanto !

Kun koraj salutoj

samideane via

Franz Josef Braun

Intertempe s-ro LEE jam sendis dankleteron, en kiu li skribas i.a.:

IKEF estas unu el la gravaj fakaj asocioj de UEA ĉar ĝi koncernas praktikan aplikadon de Esperanto en la tereno de komerco kaj internacia investo. Mi kredas ke IKEF povos helpi interkonektigi internaciajn investojn.

## Elektronika komerco kun ekologiaj indikiloj

La Kumunumo de Gotlando (Svedio) intencas enkonduki elektronikan komercon kun ekologiaj indikiloj. La elektronika komerco signifas tutan aferzorgon (oferto, mendo, fakturado, ktp.) pere de internaciaj komputilaj retoj. Ĉe la elekto inter la oferto oni intencas decidi konsiderinte ankaŭ la ekologiajn trajtojn de la produkto (kemia-venena-enhavo-recikleblo ktp.).

Sed kiuj informoj necesas por kompari la produktojn kaj povi direkti la aĉetojn, ke ili kongruu kun la principoj de daŭriga evoluo ? La Komunumo de Gotlando okupiĝas pri la realigo de ĝuste tiu projekto pere de sveda samtema fondaĵo. Ili opinias, ke tiu ĉi projekto ampleksu ne nur svedajn kaj nordiajn komunumojn, sed fariĝu ankaŭ internacia. Se vi volas partopreni, bv. kontakti nin kiel eble plej frue. En la nuna unua fazo ni kalkulas pri sinanonco de potenciale interesiĝantaj urbaj komunumoj, aŭ de personoj havantaj proksiman rilaton al tiaj instancoj.

Adreso: Gotlanda Komunumo, Eko-komunuma projekto, Martin Strid, Skarphällsgatan 16, S-62182 VISBY, Svedio.

(El revuo Eventoj, 2/aŭg. 95)

Post la ĝenerala kunveno, nia belga membro s-ino Flory WITDOECKT (IKEF 78) montris 15minutan esperantlingvan filmon pri akvopuriga instalaĵo de la firmao Aquasystems el Halle, Belgio. La esperantlingva versio estis farita kun interveno de s-ino Witdoeckt okaze de negocado inter Aquasystems kaj ĉinaj firmaoj.

Vizito en la Komerca ĉambro de Tampereo

Je vendredo, la 28a de julio, post la 10a horo ekmarŝis de antaŭ la kongresejo en Tampereo grupo de entute 30 personoj (IKEF-anoj kaj aliaj interesitoj) en direkto de la urbocentro. Post 15 minutoj ili atingis la konstruaĵon de la Komerca ĉambro, kiu situas rekte apud la malsupra finaĵo de la Tammer-torento, kiu interligas la supran lagan Näsijärvi kun la malsupra Pyhäjärvi. Per sia rapidfluo sekve de 18 metra diferenco en la altitudo de ambaŭ lagoj ĝi kapablas multflanke servi al kurento-produktado kaj al diversaj industriaj branĉoj, kaj pro tio la Tammer-torento fariĝis la kialo por setlado tien kaj finfine por la fondo de la urbo en la jaro 1779.

En la Komerca ĉambro akceptis la grupon s-ino Kristiina KOIVISTO, vicdirektorino de la ĉambro. IKEF-prezidanto Frans Josef BRAUN klarigis la kaŭzon pro tiu vizito. Ĉiam dum la semajno okaze de Universala Kongreso, IKEF klopodas aranĝi tian viziton, ĉu ĉe Komerca ĉambro, ĉu ĉe komerc-ekonomia altlernejo aŭ ĉu ĉe iu loka fabriko. S-ino Heta KESÄLÄ, vicprezidantino de la LKK en Tamperio, laŭdinde bonege faris la interpretadon finne/Esperante kaj renverse dum la 90minuta informfluo.

S-ino KOIVISTO klarigis la celojn, taskojn kaj organizadon de la Komercaj ĉambroj en Finnlando - kiuj diferencas iom de tiuj en aliaj landoj - kaj ŝi raportis pri la ekonomia situacio en la urbo kaj regiono Tampereo kaj en Finnlando entute. Ekzistas en la lando 23 de tiaj Komercaj ĉambroj, kiuj havas centran superan organizaĵon en Helsinki. Ĉiu opa ĉambro estas sendependa, memstara kaj privata, sed tamen leĝe observata. Ĉefa tasko estas informado pri komerco, helpo kaj disponigo de dokumentoj por eksterlanda komerco (importo/eksporto) kaj eldono de ekspertizoj kaj konsilado al entreprenoj. Klerigo kaj trejnado por profesio ne apartenas al la tasko de finna Komerca ĉambro.

La ĉambro en Tampereo havas 650 membrojn (firmaojn kun internacia agado). La plej granda estas la firmao NOKIA. (Nokio estas urbo proksima al Tampereo). La prezidanto de la Komerca ĉambro ĉiam venas el la industrio; La ĉambro estas financata ĉefe per membrokotizoj laŭ nombro de dungitoj kaj bilancsumo (minimume 700 FIM, maksimume 18.000 FIM).

La industrio en Tampereo komence konsistigis antaŭ ĉio teksaĵojn kaj ŝuojn, nuntempe ĉefe ligno-, paper- kaj metalindustrion, inter la lasta ekzemple la fabrikadon de dragiloj, konstrumaŝinoj, maŝinoj por prilabori rokojn kaj ŝtonojn (firmao Lokotrack), minekspluatado (firmao Valmeto) kaj ekipaĵoj por havenoj. La eksportkvoto estas 40 %, el tio du trionoj al EU-ŝtatoj. La malproksimecon al la maro ili sentas iom malhelpa pro la enlanda surstrata transporto de Tampereo al la havenoj ekzemple Helsinki aŭ Turku.

Ankaŭ en Finnlando la kvoto de senlaboreco dum la lastaj jaroj draste plialtiĝis al rekorda nivelo de 18 %, speciale inter gejunuloj al 33 %. Kaŭzo por tio estas la malbona konjunkturo en la eŭropaj landoj, sed ĉefe la elfalo de la eksportoj al la najbara Ruslando, pro ruiniĝo de ties ekonomio. Dum la diskutado la vizitantoj resonis, ke eble la eduksistemo en Finnlando devus esti reformita kaj adaptita al na nunaj bezonoj.

Do, la informiĝo dum tiu aranĝo pri la ekonomiaj situacio kaj problemoj estis por la vizitintoj tre valoraj kaj interesaj. S-ro BRAUN dankas al s-ino KOIVISTO pro la preteco al tiu aranĝo kaj efektivigado de ĝi, same al s-ino KESÄLÄ por ŝia elstara interpretado.

FJB

Regularo por perantoj fiksita

Jen la teksto de la regularo por perantoj kiu estis akceptita dum la UK en Tampere:

1. Kondiĉoj

Kandidat-peranto estu membro ekde du jaroj, kiu regule pagis sian kotizon Li pruvu ke li havas eblon transpagi kotizojn al la kasisto.

2. Nomumo

La prezidanto kaj la kasisto kune proponas nomumon de nova peranto al la membroj per cirkulero aŭ per anonco en la revuo de la asocio. La nomumo iĝas definitiva se neniu malaprobas ĝin ene de 3 monatoj post la propono. En kazo de malaprobo(j) la estaro decidos.

3. Taskoj de peranto

En sia lando aŭ regiono, la peranto kolektas kaj transpagas la kotizojn, reprezentas la asocion kaj varbas por ĝi. Li raportu pri sia agado al la estraro.

4. Repago de kostoj

Laŭ interkonsento kun la kasisto, la peranto elektas unu el jenaj metodoj:
- subtraho de dekono de la kolektitaj kotizoj, aŭ
- deklaro de la realaj kostoj de afranko, papero ktp.
Grandajn kostojn (vojaĝon, salajron, preslaboron...) nur eblas repagi se estas antaŭa interkonsento kun la kasisto.

5. Eksiĝo

Eksiĝo eblas pro
- peto de la peranto,
- decido de prezidanto kaj kasisto, post neplenumo de la taskoj de peranto,
- decido de la estraro.

RR

Nekrologo

Mi havas la tristan devon informi pri tio ke Prof. Dro. Wolfgang Pieper, Diploma Ekonomikisto, el Pforzheim (Germanio), forpasis la 30an de majo 1995 post longa, malfacile elportebla malsano en la aĝo de 59 jaroj.

Li multe simpatiis nian aferon kaj ofte citis Esperanton en siaj verkoj kaj prelegoj. Kiel Profesoro ĉe Akademio pri Ekonomio li rekomendis la uzadon de Esperanto aparte en la aktiveca kampo de la Ekonomio kaj de la Komerco.

Interalie li eldonis "Lexikon der Public Relations", 1a eldono 1989, 2a eldono 1993, en kiu mi havis la permeson publikigi plurpaĝan artikolon pri Esperanto kiel lingvo por publikaj rilatoj. La sama libro entenas 14-paĝan glosaron, francan kaj esperantan, faritan de mia filino.

Ni ŝuldas al li dankon kaj honoron dezirante ke lia agado rekomendi Esperanton estu ekzemplo por aliuloj.

Hans Wiersch, Welzheim (Germanio)

Anoncitaj aranĝoj

20-23 oktobro 1995, Bruno (Ĉeĥio): Festivalo de Esperantaj (vidoeo)filmoj. Informoj: KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 DOBŘICHOVICE, fakso 42-2-9912126, E-poŝto chrdle(a)kava-pech.cz.

18-19 novembro 1995, Villers-lès-Nancy, Francio: 39a Praktika Staĝo de Parolata Esperanto. Gvidanto: Pierre Janton. Informoj: s-ro Jean-Luc THIBIAS, 7 Place de Paris, F-54500 VADOEUVRE; tel. (33) 83-53-57-54.

1-5 decembro 1995, Xi'an, Ĉinio: IKEF-kunveno. Kontaktu WANG Tianyi (adreso je p. 2)

16-19 majo 1996, Ancona, Italio: 56a Internacia Fiŝkapto-Ekspozicio. Informoj: Fiera di Ancona, I-60125 ANCONA; fakso 071-5897213.

Septembro 1996, Pekino: Simpozio pri nova koncepto de scienco kaj alsciencteknikо kaj Ekspozicio/negoco de sciencteknikaj esplorfruktoj (2-8); Kurso de akupunkturo kaj masaĝo (3-23). Informoj: s-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, CN-100864 BEIJING.

Kongreso pri Diesel-motoroj

Brita Newcomen Society en majo 1997 organizos grandan kongreson okaze de la centjara ekzisto de la Diesel-motoro. Kandidat-prelegontoj (pri historio de la motoro aŭ pri firmaoj kiuj produktis/as ĝin) anoncu sin ĉe s-ro Dennis Griffiths, tel. 00-44-151-2312025, fakso 00-44-151-2981014. Laborlingvo ne menciita en la informilo; supozeble nur angla.

RR

"PAROLTURNARO" de Hans kaj Kerstin Wiersch aperis

E-Grupo "Esperanto 2000" (p.a. Marc VANDEN BEMPT, Duisburgsestr. 12, B-3001 LEUVEN) eldonis imponan parolturnaron kun 20000 elementoj (frazoj, frazeroj, dirmanieroj...) en lingvoj germana kaj esperanto de Hans kaj Kerstin Wiersch. Hans Wiersch dum multaj jaroj respondecis pri la terminologia laboro de IKEF.
Prezo: ĉ. 660 BEF + afranko.

RR

"Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj" iĝas dek-jara

Je la 15a de oktobro en Beijing okazos memorkunveno pro la dekjariĝo de la revuo Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj. Tiun revuon prizorgas prof. SHEN Chenru (IKEF 74). Jara abonprezo: 16 USD al UEA-konto tekn-m.

Nova versio de teksto-redakta programo V-ESP

Istlia Eldonejo Esperantista (L. Mee, 91 Whitebeck Court, Moorway Drive, Manchester M9 7HR, Britio; e-poŝto lorensmi(a)gn.apc.org) anoncis version 1.5 de la programo. Prezo: 5 GBP. Informbroŝuro estas havebla kontraŭ 1 IRK. Uzantoj de pli frua versio ricevos la novan version resendante la originalan diskon kun 2 IRK.

## Usona SIC-kodaro

En LM50 aperis demando rilate al la usona SIC-kodaro. SIC kutime konsistas el 4 ciferoj kaj oni povas uzi ĝin ne nur por klasifiki industriajn kompaniojn, sed ankaŭ por profesiaj servoj, vendejo, hospitaloj, publikaj oficejoj, ktp. SIC-kodaro estas la plej vaste uzata klasifika sistemo ene de Usono de enlandaj ekonomiaj statistikoj, indeksoj, ktp. Jen kelkaj ekzemploj:

364 - ekipaĵoj por elektra lumigado kaj kablado
3645 - hejmaj lumigiloj
3645 - komercaj, industriaj kaj publikaj lumigiloj
62 - borsaj kaj varaj makleristoj...
621 - borsaj makleristoj kaj entreprenoj
622 - varaj makleristoj

Jerald T. Veit (IKEF 145)

## Novaj aliĝoj

207. S-ro Stasys KRUŽINAUSKAS, Vytauto 67, LT-4270 VILKAVIŠKIS, Litovio
208. S-ro WANG Xue, 1-27-602 Caixiang Xingcun, CN-215004 SUZHOU, Ĉinio
209. S-ro Giovanni CONTI, Via F. Filzi 51, I-20032 CORMANO (Mi), Italio
210. S-ro Bertil NILSSON, Ringvägen 37 B, S-611 35 NYKÖPING, Svedio
211. S-ro MA Young-tae - Bosung Food Ind., Co., MA-106, Dong-a Apt., Daechi-dong, SEOUL 135-284, Koreio
212. S-ro Jymmy STRYHN MEYER, Thorshavnsgade 22, 2 t.v., DK-2300 KOPENHAGO S, Danlando
213. S-ro Mu Binghua, Chengdu Universitato, CN-610081 SICHUAN, CHENGDU, Ĉinio

## Komercaj petoj kaj proponoj

### Brazilo
Naturaj produktoj, precipe fruktoj, tuberoj, mielo, dolĉaĵoj, plantidoj, semoj, birdoj ktp. S-ro Djalma Alves Ferreira, Rua Manoel Pacheco 114, Bento Quirino, CEP 14200, Sao Paulo, SP.

### Ĉinio

La ĉina peranto de IKEF, WANG Tianyi, regule eldonas la ĉinlingvan informilon monatan BULTENO DE ESPERANTA KOMERCO (BEK), kiun uzas ĉ. 300 geesperantistoj tra Ĉinio. BEK ĉiam bonvenigas kaj senpage aperigas viajn ofertojn kaj ideojn. Adreso je p. 2. Fakso +86-29-721.80.42.

### Rusio
Firmao DIAS komercas kosmetikaĵojn, ornamaĵojn k.s. Ĝi serĉas liverantojn de aĵoj por teatro: kostumoj, baletjupoj, baletŝuoj, perukoj, ŝminko ktp. DIAS, S-ro Rostislav Toltchinski, B.P. 178, RUS-198260 ST. PETERBURG, fakso 7.812.5577338.

### Uzbekistano
Ĉiuj sferoj de negocado, investo kaj turismo. Firmao "Oriento", P.O.B. 76, 703000 SAMARKAND (esperante, angle, ruse, uzbeke).

### Vietnamio
Vizitantajn komercistojn, turistojn... volonte helpas s-ro Nguyen Do Khanh, Phudoc Long, Huyên Thu Duc, Thanh pho, Ho-Chi-Minh. Skribu detale 2-3 monatojn antaŭe kun 2 IRK.

Nomo: François-Xavier GILBERT Membronumero: 14

Privata adreso: 33, rue Louvière, F-55190 VOID-VACON

******************************************************

Nomo: YAMASAKI Seikô Membronumero: 43

Telekomunikado: fakso +81-3-3285-9969;
e-poŝto: study069(a)jpndokyo.dokkyo.ac.jp

Rimarko: Laboras en kompanio por trejnado de oficejaj laboristoj (precipe, proceduroj de internacia komerco) kaj por provizo de lingvaj servoj (tradukado, interpretado).

******************************************************

Nomo: Zandandu Ntomono ZOLA Membronumero: 181

Privata adreso: B.P. 2503, KINSHASA-GOMBE, Zairio

******************************************************

Nomo: S-ro HUANG Zhengsu Membronumero: 183

Profesio: komercisto Naskiĝjaro: 1957

Firmao/Asocio: Anhua United Ent. Trading Co. Ltd

Adreso: privata: Liuan lu 26, Box 136, CN-230069 HEFEI; profesia: No. 12, Da Ximen, Chaogang, CN-230061 HEFEI

Telekomunikado: telefono/fakso 0086-551-2614014

Proponataj varoj/servoj: eksporto de varoj, informservo, komerca perado, ktp.

Dezirataj varoj/servoj: serĉas kunlaboranton-partneron-peranton tutmonde por disvendado; investantoj bonvenaj.
Lingvaj kapabloj: Esperanto, angla
Rimarkoj: Bv. kontakti kun privata adreso.

Nomo: S-ino WANG Jing Rong Membronumero: 192

Profesio: kunordiganto

Adreso oficeja: China Bohai Coastal Region Economic Development Co. Ltd., No. 45 Dali Road, Heping District, CN-350050 TIANJIN, Ĉinio

Telekomunikado: tel. kaj fakso (022) 332-3943

Proponataj kaj dezirataj varoj/servoj: kunlaboro aŭ partnereco en konstruado de varmo/energio-centralo (24000 KW, taksita investo 38 milionoj da USD) en interesa geografia regiono.

*****************************************************

Nomo: Vang Bing Membronumero: 202

Telekomunikado: nova hejma tel. 00-86-556-8926858

Proponataj varoj/servoj: metiaĵoj (lignoskulptaĵoj, bambuaĵoj), teksaĵoj, ilaro, papero, vestaĵoj...

Deziratajvaroj/servoj: ĉina-esperanta tradukilo, mineralakva maŝinaro; turisma helikoptero, ŝtaliga ekipaĵo, ekipaĵo de fandado pri rutilo.

Nomo: YANG Zhaoyin Membronumero: 206

naskiĝjaro: 1957

Profesio: komercisto

Firmao/Asocio:
Yardly Ideala Komerca Kompanio

Adreso: No. 6-1, 94-Long, Juqianjie, CN-213003 CHANGZHOU, Jiangsu
Telekomunikado: (hejme) tel. 86-519-6627532 (oficeje) fakso 86-519-6683916, tel. 86-519-3273957, 6683916, 6629957
Proponataj kaj dezirataj varoj/servoj: diversaj importo kaj eksporto laŭ bezonoj, (invest-)perado, turismo
Lingvaj kapabloj: angla, japana, germana, hispana (povas legi), ĉina

*******************************************************

Nomo: S-ro Stasys KRUŽINAUSKAS Membronumero: 207

Profesio: prezidanto de firmao Naskiĝjaro: 1957

Firmao/Asocio: privata akcia kompanio "STOP"

Adreso: (pr.) Rožių 45 aŭ ( of.) Vytauto 67, LT-4270 VILKAVIŠKIS, Litovio
Telekomunikado: tel. pr. 370-42-52989, tel. of. 370-42-51968, fakso of. 370-42-54535
Proponataj varoj/servoj: riparado de aŭtomobiloj, etskala turismado
Dezirataj varoj/servoj: rezervaj partoj por aŭtomobiloj, manĝaĵoj, varoj por hejma mastrumado; kunlaboro en agrikulturado
Lingvaj kapabloj: litova, rusa, angla
Rimarko: disponas pri parcelo de 6 ha apud lago

Nomo: S-ro MA Young-tae Membronumero: 212

Naskiĝjaro: 1946

Profesio: konsilisto pri saniga nutraĵo

Kompanio: Bosung Food Ind. Co.

Adreso profesia: Chohoon Bld., 4th floor, #834-46 Yoksam-dong, SEUL 135-080, Koreio

Telekomunikado: tel. +822 709 2145, fakso +822 555 7754

Proponataj kaj deziratat varoj/servoj: Post solida sukceso enlande, la firmao intencas eksporti sanigajn nutraĵojn (Kotrang Gold, Onbangne) kaj varbas sol-agentojn eksterlande.

*******************************************************

Nomo: Inĝ. Zdeněk POLÁK Membronumero: 214

naskiĝjaro: 1934

Profesio: tradukisto (rusa, franca, esperanta); eksperto pri ekonomia kaj fervoja trafiko

Firmao/Asocio: Trafikfakultato de Universitato Pardubice

Adreso privata: CZ-561 25 RUDOLTICE 95, Ĉeĥio

Telekomunikado: tel. (0467) 6778